

**juna  
amiko**

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE  
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

**ILEI**

JUNIO 2001

N-ro 2 (97)



Pri la lingv'ajo  
kaj ortografio<sup>1</sup> de  
**juna amiko**

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vort'radikojn. Tiuj ĉi vortoj aperis en: **Esperanto, Minimum szótár** (1995), kiu jam plene elĉerp'iĝis. Nun ili estas alir'eblaj ĉe Interreto, en la hejmplaĝo de Juna Amiko: <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

**Krom-signoj**, kiuj helpas komenc'antojn:

**Divido-streko(-)** trov'iĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

**Vertikala strek'eto (')** signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'iĝi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto revenas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino... ) ni ne uzas kromsignon.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo.



**Sur la titol'paĝo:**  
**Somer'meza**  
**sun'sub-iro kaj**  
**sun'lev'iĝo en**  
**Norda Finnlando**  
**(Laponio)**

## Baldaŭ sekvos n-ro 100

*Se vi re-iras al la titol'paĝo, vi trovas, ke nun vi tenas en la mano la numeron 97. Tio signifas, ke baldaŭ ni jubileos. Se ĉio iros glate, en marto aperos la rond'cifera numero 100 de Juna Amiko. Tio estas rekorda nombro ĉe period'ajo por infanoj kaj adolesk'uloj.*

*Mi ne volas longe rakonti pri la ek-esto de Juna Amiko. En alia fojo, eble, mi dediĉos apartan artikolon al miaj foraj memoroj. Ĉi-foje la demando estas: Kiel jubileitan memor'indan okaz'ont'ajon? Se ni estus riĉaj, ni povus sen-page dis-donaci lukse pres'itan numeron, kaj tio estus bon'ega reklamo; aŭ fari bankedon por la plej fidelaj leg'antoj kaj per-antoj de nia revuo. Sed vi scias, riĉaj ni ne estas, male.*

*Post longa medit'ado mi el-pensis, do, inviti vin, kara leganto, al komuna redaktado. Mi petas vin kontribui per verk'etoj ĉia-specaj. Mi tre ĝojus, se la tuta numero konsistus el variaj kontribuajoj de la legantoj. Sendu al ni enigmojn, ludojn, kuriozajojn, kantojn, desegn'ajojn, ktp. Skribu al ni, kio mankas en la revuo, kion vi prefere legus sur la paĝoj de Juna Amiko.*

*La kontribuajoj atingu nin ĝis la fino de decembro. Mi esperas, ke vi ne rifuzos la inviton kaj kontribuos per io tre interesa.*

*Geza Kurucz*  
redaktoro

1. prefer'anta neniun aparte / 2. komuna por ĉiuj / 3. sen apartaj meritoj don'ante avantaĝon al iu(j).

Per Esperanto trovi amikojn en la tuta mondo eblas dank' al la  
Koresponda Servo Mond'skala

**KoSoMo**



**UZU ĜIN!**

KoSoMo estas asocio sen profita celo. Ĝi celas kontaktojn inter praktik'antoj de Esperanto.

Ĉiun jaron pli ol 600 petoj atingas ĝin el ĉiuj kontinentoj, el ĉiuj medioj, de knaboj aŭ knabinoj, jun'uloj kaj malpli junaj homoj. Ili inter-ŝanĝas ideojn, sentojn, donacojn, per poŝto aŭ Interreto, sin perfekt'ig'ante en la Internacia Lingvo.

Ĉiu individuo / grupo, kiu deziras rekte ricevi adreson, aldonu du internaciajn respond'kuponojn. Post malpli ol tri semajnoj vi ricevos liston de korespond'em'uloj, kiuj pleje kontent'igas viajn dezirojn.

Por ricevi korespond'anton, donu jenajn informojn (bon'volu skribi pres'litere):

Familia nomo.....

Persona nomo.....

\* Viro / virino edz(in)'iĝ'inta: jes / ne

Aĝo: ..... profesio .....

\* Ĉu vi sci'povas Esperanton: bone / mez'bone / iomete

Adreso — strato .....

Poŝta kodo ..... urbo .....

Lando .....

Deziras ..... (numero) korespond'antojn

\* Prefer'inde: viroj / virinoj / ambaŭ

\*Preferinde el la landoj .....

Dezir'ata(j) temo(j) .....

\* Deziras unu / plurajn korespondantojn en la sama lando

*\*For-streku la ne-validan.*

La foto-kopiitan kaj plen'ig'itan inform'ilon sendu al:

K.S.M.; B.P. 6; FR-55000 Longeville en Barrois; Francio

Rete: [ksmesperanto@aol.com](mailto:ksmesperanto@aol.com)

TTT: [perso.libertysurf.fr/kosomo](http://perso.libertysurf.fr/kosomo)

Kun ĉiuj demandoj turnu vin al la supra adreso.



En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo per la plumo de nia fidela kunlaboranto, el-stara islanda poeto, **Baldur RAGNARSSON**. Konsciuj, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

## 14 Nikolai Hohlov

Nia lasta kultur'bildo prezentis la rusan poeton *E. Mihalski*, la nuna prezentas lian samland'anon, la poeton<sup>2</sup> *Nikolai HOHLOV*. Iel mi ĉiam kun-ligas tiujn poetojn en mia menso<sup>3</sup>, iliaj poem'libroj *Prologo*<sup>4</sup> kaj *La Tajdo*<sup>5</sup>, kiujn mi ekposedis antaŭ jar'dekoj, ĉiam staris apudaj en mia libro-ŝranko. Malgrand'formataj<sup>6</sup>, modestaj laŭ aspekto, originale personaj laŭ siaj temoj. Kiel poetoj ili ambaŭ estas sent'emaj lirik'istoj<sup>8</sup>, sed la eksteraj cirkonstancoj evolu'igis ĉe ili socialan<sup>9</sup> konsciencan, kiu influis ilian verk'adon.

**N**ikolai Hohlov naskiĝis en Moskvo en 1891 kaj lernis Esperanton jam kiel jun'ulo. Li studis ekonomion<sup>10</sup> ĉe industria entrepreno. Kiel verkisto en Esperanto li estis aktiva ĉefe en la tria jar'deko de la ĵus pas'inta jar'cento. Liaj traduk'itaj verkoj multe pli ampleksas<sup>11</sup> ol

la originalaj, i.a. li tradukis el la rusa la gravan *Historion de la*

# BILDOJ EL LA HISTORIO

*Mondo-lingvo* de *Ernest Drezen* (1928). Liaj originalaj verkoj estas nur du, komedio<sup>12</sup> titol'ita *La morto de la deleg'ito*<sup>13</sup> de *UEA* (1924) kaj la poem'aro *La Tajdo* (1928).

**L**a Tajdo en-havas nur 28 poemojn. Hohlov citas<sup>14</sup> kiel moton<sup>15</sup> por sia poemaro la komencajn versojn de *Art poétique* de la franca simbol'isma poeto *Paul Verlaine: De la musique avant toute chose* (Vi devas havi muzikon antaŭ ĉio). Per tio Hohlov certe volas akcenti<sup>16</sup>, ke sonora lingvo, sonora ritmo, estas por li grava elemento de la poezio<sup>17</sup>. Kaj certe, liaj poemoj



abunde atestas tiun vid'punkton. Tamen estas interese konstati ke – dum la nova generacio<sup>18</sup> de francaj poetoj post Verlaine trovis lian poezion tro vir'in'eca, tro gracia<sup>19</sup> kaj tro plaĉa en siaj muzikaj efektoj<sup>20</sup> – la poemoj de Hohlov ne efikas en tiu maniero malgraŭ ilia bel'son'eco. Tion kaŭzas sen-dube, ke ofte relismaj trajtoj kombin'iĝas<sup>21</sup> kun lia lirik-

*Pro tiu tajdo vibras mia roko  
Kaj vibros ĝis la falo*

*sen re-ven'...*

**L**a poemo klare montras, ke la poeto sentas la eksteran real'aĵon<sup>23</sup> kiel forton, kiu konstante influas lian propran vivon, liajn sentojn. En alia poemo (*Chante-claire*) li rigardas sin kiel vek'anton, kiel kamaradon

# LITERATURO DE LA ESPERANTA

emo, tiel ke la temoj havas ian duoblan vivon. La poeto uzas la titolon de la komenca poemo ankaŭ kiel titolon de sia poemaro. Tio montras, ke ĝi havas gravan simbolan signifon, kiel tuj evident'iĝas:

*Alterne ĉiam venas kaj de-fluas  
La ondoj de la vivo en la kor',  
Simile al la maro ili bruas  
Kaj rokojn atak'inte rampas for.*

La poeto komparas sian koron, sin mem, al roko, kiun vibr'igas<sup>22</sup> la tajdo de la vivo ĝis, tiu roko, fine, dis-falos kiel la rokoj apud-maraj:

de la koko:

*Poeto kaj koko anoncu  
al-venon de ĉiu aŭroro<sup>24</sup>!*

Se ne estus tute klare, al kia “aŭroro” aludas la poeto, oni povas en aliaj poemoj pli rekte kompreni, ke socialaj temoj estas proksimaj al lia koro kaj ke li havas esperon pri pli bona vivo por la homoj. En la poemo *Eŭropo* li pri-skribas, per fortaj vortoj, situacion, kie regas veoj kaj lamentoj<sup>25</sup> de sufer'antoj. Kaj li esprimas esperon pri star'igo de nova mondo “de l' paco kaj libero”, kie la Laboro estos “reĝino de la tero”.

\* \* \*

**M**algraŭ tiaj forte socialaj temoj, oni tamen pli ofte citas tiujn poemojn de Hohlov, kie amaj sentoj kaj spertoj estas esprim'ataj per sonoraj vortoj kaj ritmoj. Unu el

tiuj estas la poemo *Vintra fabelo*, kiu priskribas sledan veturon en akompano de la am'at'ino. La ritmo estas rapida kaj la sonoraj rimoj<sup>26</sup> dance ĝojas:

*Sur la sledo<sup>27</sup>, svelta<sup>28</sup> sledo, post amuza kabaredo<sup>29</sup>,  
Kun tint'ila<sup>30</sup> sonor'ad'  
Ni veturas – aventuras, la ĉevaloj fluge kuras  
Sub la stela miriad<sup>31</sup>.*

...  
*Hej, ĉevaloj, hufaj<sup>32</sup> ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj<sup>33</sup>  
Por danc'anta cigan'in',  
Uraganu<sup>34</sup>, akompanu, dolĉe tiklu<sup>35</sup>, ĝu'tiranu<sup>36</sup>  
Per freneza takto<sup>37</sup> nin!*

**T**iaj poemoj efikas tamen sur unu nivelo, tiu de bela sonoro, al ili mankas la

profundo de tiuj poemoj de Hohlov, kiuj kombinas individuajn kaj socialajn sentojn.

1. hav'ajo ricev'ita post antaŭulo(j) / 2. imag'ajo / 3. hard'ita fero / 4. poem'verk'isto / 5. tempo-daŭro / 6. ver'sajne / 7. okul'frape fortan / 8. rapid'flua monta rivero / 9. tragedio: mal-gaja teatr'ajo kun morto de la ĉef'heroo / 10. en-konduka parto de verko / 11. notoj, precizaj sciigoj / 12. ardaj deziroj kiuj superas aliajn ideojn / 13. plene sin donas / 14. mal-sever'eco, pardon'emo / 15. bela trinko-vazo / 16. kredo pri ebl'eco scii eĉ absoluton / 17. arto pri vers'far'ado / 18. sin-sekvo de poste-uloj / 19. korpe bel'aspekta / 20. efikoj / 21. kombini: kun-meti divers'maniere / 22. son'igi, spirite tuŝi / 23. tion, kio vere ekzistas / 24. matena krepusko antaŭ sun'lev'iĝo / 25. mal-ĝojaj plendoj / 26. verso-finoj sam- aŭ simil'sonaj / 27. glit'vetur'ilo / 28. elegante mal-dika / 29. teatr'ajo rid'ige amuza / 30. tintilo: malgranda sonor'ilo / 31. ne-kalkul'eble multaj / 32. piedo kiel ĉe ĉevalo / 33. frap'muzik'ilo / 34. uragano: vent'ego / 35. est'igi mal-agrablan senton per gra'eto de haŭto / 36. tirano: kruela reg'anto / 37. egal'tempa mezuro.

**Internacia Junulara Kongreso**  
**La 57-a IJK okazos**  
**de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2001**  
**en Stasburgo**



Pridemandu viajn lernantojn pri aŭtomobiloj kaj iliaj konsistigaj detaloj: kluĉpedalo/kluĉilo, akcelopedalo/akcelilo, bremspedalo, stirrado, rapidumŝanĝilo, dampilo, ktp. Ĉu iu el la lernantoj menciis KATALIZILON? Li/ŝi eble ankaŭ scipovas difini ties taskon kaj funkcion.

Por tiu ĉi eksperto trovu helpanton, asistanton kaj preparu por ili detalan priskribon de la antaŭplanita eksperimento (vidu sube) kaj enmanigu al ili facile kompreneblan etnolingvan informon pri la laboro de aŭtomobila katalizilo. La tasko estu: En la sekva instruhoro ambaŭ volontuloj parolu pri la temo, igu la samklasanojn diveni pri supezeblaj rezultoj, observoj, konstatoj de la promesita eksperimento kaj, fine, demonstremu la eksperimenton. Poste, okazu, laŭeble sub la gvidado de la sinpreparintaj "ekspertoj", interligo de la du priparolitaj fenomenoj, nome: pri la aŭtomobila katalizilo kaj pri la cindroefiko sur la sukeron.

### Priskribo de la eksperimento:

- a) Sukerkubeto kuŝu sur ne bruligebla submetaĵo (ekz. fermilo de konservujo por konfitajoj). Ekbruligu alumeton! Provu ekbruligi per ĝi ankaŭ la sukercubeton – verŝajne tute vane.
- b) Prenu cigaredon kaj ekbruligu ĝin! Produktu iomete da cigareda cindro. Trempu iun angulon de la sukercubeto en la cindron kaj, poste, ĉe tiu angulo denove provu ekbruligi la sukeron, kiu – mi estas preskaŭ certa – fandiĝante nun forbrulas.



*"Vigliĝas la menso  
per streĉo de l' penso."*

### Klarigo:

La cindro plenumas similan rolon kiel certaj noblaj metaloj (plateno, paladio, rodio) en aŭtomobila purigilo de la elflu-gaso: tiaj substancoj povas influi la rapidecon de kemia reakcio. Ili povas ekfunkciigi, malligi (=katalizi) kemian reakcion sen propra nuliĝo, malapero.

Tiun fenomenon malkovris en la jaro 1823 *Johann DÖBEREINER* [*Debereiner*], profesoro pri kemio, farmacio kaj teknologio en la urbo *Jena*.

### Metodika konsilo:

Ĉar temas pri instruado de Esperanto, por la instruisto la lingvo kaj ĝia apliko staru en la centro de la leciono. Pro tio la eksperimentado estu akompanata de daŭra komentado de la faroj flanke de la "ekspertoj" kaj poste okazu rerakonto de la observoj flanke de la spektintoj.

### Lingvaj sugestoj:


Estas bezonataj jenaj *verabaj radikoj* por klarigi kaj priskribi la eksperimenton.

*Transitivaj verbradikoj:* pren-, met-, prov-, produkt-, tremp-, fand-, influ-, lig-, pov-, kovr-, ferm-, ŝanĝ-.

*Netransitivaj verbradikoj:* brul-, sukces-, kuŝ-, aper-, flu-.

*Fakvortoj* por eventuale realigebla pli profunda klarigo: katalizi, redukti, hidrogena karbido, karbona dioksido, karbona oksido, nitrogeno, nitrogena oksido.

Till DAHLENBURG, Germanio



estis la Unua Ministro en nord-okcidenta reĝa ŝtato kun ĉefurbo Porpandar, naskiĝ'urbo de *Mahatmo Gandhi*. La patro havis nenian ambicion<sup>2</sup> amasigi riĉ'ajojn. La patrino, *s-ino Putli Bai* estis simpla, religiema vir'ino. Ĉiun tagon, ŝi iris al la templo<sup>3</sup> kaj preĝ'adis arde. Sen preĝi ŝi neniam manĝis.

La rigoraĵ viv'manieroj de la gepatroj forte influis<sup>4</sup>

# MAHATMO GANDHI

La plej granda filo de Hindujo kaj, eble, de la tuta mondo en la 20-a jar'cento estas *Mohan Das Karamĉand Gandhi*, kiu ricevis la titolon MAHATMO, don'ata en Hindujo, kutime, al sankt'ulo. Mahatmo konsistas el du sanskritaj vortoj – MAHA kaj ATMO: Granda Animo. Sed, Mohan Das ricevis tiun honoran titolon, kiam li okupis sin pri politiko. Estas oni-diro: “*Politiko estas la ludo de kanaj'aro*”<sup>1</sup>. Malgraŭ tio, li el-meritis tiun titolon, ĉar li agis kiel sankta homo.

De kie li havis tiujn kvalitojn? Parte, de la gepatroj. La patro, *s-ro Karamĉand Gandhi*

la knabon.

## *Lernejaj tra-viv'ajoj:*

(a) Gandhi lernis en la dua klaso de la elementa<sup>5</sup> lernejo. Li ne alte taksis siajn kapablojn kaj inteligent'econ<sup>6</sup>. Do, kiam li ricevis premiojn, li vere ĉiu-foje surpriz'igis<sup>7</sup>. Eĉ la plej eta neperfekt'ajo<sup>8</sup>, sia-parte, el-tiris larmojn el liaj okuloj. Iam, kvankam ne kulpa, Gandhi ricevis korpan punon. La nura penso, ke oni konsideris, ke li meritis la punon, mal-feliĉ'igis lin pli ol la puno mem. La psika<sup>9</sup> doloro estis pli granda ol la korpa.

(b) Iam, inspekt'isto<sup>10</sup> pri edukado vizitis la lernejon. Li proponis liter'umi kvin anglajn vortojn. Unu el ili estis 'kettle'.



Gandhi ne povis ĝin ĝuste literumi. La instruisto vidis la eraron kaj per sia boto-pinto tuŝis la piedon de Gandhi por atentigi lin kaj por ke li kopiu la ĝustan formon de la najbaro. Gand-

*Jun'ula travivaĵo: Ahimsa (ne-perforto)*

'AHISMA' estas sanskrita<sup>11</sup> vorto kaj signifas: fari turmenton<sup>12</sup> nek korpe, nek mense<sup>13</sup> kontraŭ iu ajn est'aĵo.

hi miris, ke la estro, kiu devas kontroli por ke neniu kopiu, mem instigas fari la ne-permesitan agon. Pli poste, vane provis la instruisto kompren'igi al Gandhi lian stult'econ. Li neniel cedis.

fesi ĉion al la patro. Sed, li ne kuraĝis al-fronti la patron, ne pro timo, ke la patro batos lin (fakte la patro neniam batis

## la sankta politikisto

**L**a sekv'anta okaz'int'aĵo iĝis la plej bona instruo al Gandhi pri Ahimsa. Kun sia juna parenco Gandhi komencis fumi cigaredon kaŝe, ĉar liaj gepatroj ne tolerus tian ag'adon. Fakte, Gandhi ne ŝatis la odoron de la cigared'fumo, sed fumis nur por la plezuro vidi la fumon el-ig'atan el la buŝo. Problemo estis la mono por la cigaredo. Gandhi komencis ŝteli mon'erojn el la poŝo de la ĉemizo de la hejma serv'isto... Foje, kiam la poŝo estis malplena, Gandhi tranĉis pec'eton da oro el la braceleto<sup>14</sup> de sia frato kun la celo mon'igi ĝin por aĉeti cigaredojn... Baldaŭ poste, la kulpo de tia agado ege turmentis lin. Li decidis kon-

lin), sed pro timo, ke la mal-sana patro suferos dolor'egon. Skribe, li konfesis ĉion kaj petis la patron ne puni sin pro la kulpo de la filo, male, puni lin adekvate<sup>15</sup>. Fine, li ĵuris, ke neniam plu li agos tiel.

**7** rem'ante Gandhi trans-donis la leteron al la patro, kuŝ'anta en malsan'lito. La patro legis la leteron kaj larm-gutoj plen'igis liajn okulojn. Dum momento, kun ferm'itaj okuloj, li restis kaj, poste, disŝiris la leteron kaj silentis... Vid'inte la puran emocion<sup>16</sup> de la patro, Gandhi ek-ploris. Ans-tataŭ admoni<sup>17</sup>, riproĉi aŭ puni, la patro el-kore pardonis sen-vorte. Est'ante juna, tiu-tempe,

Gandhi pensis, ke tiu nobla ago estis *patra amo*. Nur pli poste, li komprenis, ke tio estas *neperforto*, kiun praktikis Sinjoro Budho<sup>18</sup> kaj aliaj sankt'uloj. Gandhi diris: *Bon'fara ago por si mem mortas kun si, dum ago bonfara por ĉiu estaĵo iĝas sen-morta.*

### *Politika agado*

**S**ub-prem'ita de Britoj, Hindujo sufer'adis ĉirkaŭ 250-jaran sklav'econ<sup>19</sup>. Kiam, post pluraj kun-venoj kun la brita reg'ist'aro, Mahatmo Gandhi trovis, ke la reg'anto ne volis akcepti la sen-de-pend'econ de Hindujo, li mal-kaŝe deklaris la ne-kooperan<sup>20</sup> mov'adon, tute pacan kaj neper-fortan. Kolektive, la popolo ne pagos la mal-justan kaj troan imposton, dev'ig'itan de la reg'anto. La re-ago de la registaro estis tute barbara<sup>21</sup>. La pacan hom'amason dis-batis polic'anoj. Eĉ vir'inojn kaj junulojn ili ne indulgis<sup>22</sup>.

**M**ahatmo Gandhi al-vokis la tutan hindan popolon liber'igi sin de la tirana<sup>23</sup> reg'ist'aro per la movado '*For-lasu Hindujon*'. La tuta popolo sin ĵetis en la movadon kaj sekvis la neperforton. La britoj kons-tatis, ke ili ne plu povas regi kaj Hindujo gajnis sendepend-

econ. Not'inda estas la fakto, ke sen mort'igaj arm'iloj, Mahatmo Gandhi, per la sola ilo de paca neperforta movado, liber'igis Hindujon.

### *Sprit'eco de Gandhi*

**L**a spriteco de Gandhi estis tiel forta kiel lia patriot-eco<sup>24</sup>. La lukto por liberigi lian landon ne obstrukcis<sup>25</sup> lian sprit-econ. La brita regno invitis Gandhi-n por diskuto pri la sendependeco de Hindujo. Post la diskuto, Gandhi estis invit'ita al Buckingham Palaco por akcepto.

**L**i iris vest'ita en siaj kutimaj vestoj: dhoti – longa tuko volv'ita ĉirkaŭ la talio, hejm'teks'ita ŝalo<sup>26</sup> por kovri la trunkon kaj sandal'paro<sup>27</sup> sub la piedoj.

**Ĝ**u rimarkis: "*Gandhi, ĉu vi pensas, ke vi estas sufiĉe vestita por la akcepto de la Reĝa Moŝto?*"

Gandhi sprite respondis: "*Nu, Lia Reĝa Moŝto havas sur si sufiĉan veston por ambaŭ.*"

**H**indoj fiere diras: "*Gandhi estas la Patro de la hinda nacio.*"

*S-ino Sai SARANATH, Hindio*

PIED'NOTOJ sur paĝo 11



1. kanajo: fi-homo / 2. arda deziro akiri gloron / 3. preĝeĵo / 4. efikas sur iun / 5. baz'grada / 6. inteligenta: vigle pens'anta, saĝa / 7. miris pro subita neatend'it'eco / 8. perfekta: sen-erara / 9. mal-korpa / 10. kontrol'isto / 11. aparten'anta al la pra-hinda lingvo / 12. intence kaŭz'itan doloron / 13. menso: pens'anta parto de la homo / 14. ornam'ajo ĉirkaŭ brako / 15. konforme al la ago / 16. kortuŝon / 17. atent'igi pri devoj / 18. fond'into de religio; klar'vid'ulo / 19. sklavo: sen-raĵta homo / 20. mal-obeeman / 21. kruef'ega, mal-homa / 22. traktis ne-severe / 23. kruef'ega (parol'ante pri reganto) / 24. patr'uf'amo / 25. mal-helpis, fermis, mal-eb'ligis / 26. longa mallarĝa teks'ajo / 27. sandalo: tre simpla pied'vesto.

La radikoj de somermeza festo "Juhannus" (svede Midsommar) en Finnlando etend'iĝas tre foren en la pas'int'eco. Ĝi okazas proksime al la somera solstico<sup>1</sup>, nun-tempe ĉiam sabate, inter la 20-a kaj 26-a de junio. Ĝin karakterizas sunaj mild'eco kaj lum'eco tra-nokta, freŝa verdo de ĉiuj kresk'ajoj, herb'ejaj floroj, plaŭd'ado<sup>2</sup> de akvoj, liber'ig'itaj el sub la vintra glacio, danc'ado kaj esper'plena ĝojo.

Por kompreni ĉion tion, oni devas memori, ke en la pasinteco somero multe pli klare kontrastis<sup>3</sup> kun vintro: dum 8-9 monatoj mankis varmo kaj lumo, verdaj folioj, herbo, floroj. Nun-tempe la kontrasto ne estas tiom akra, ĉar eĉ dum vintro oni povas ĝui elektran lumon kaj varmon, la kolorojn de import'itaj<sup>4</sup> floroj, fruktoj kaj legomoj.

La nomo "Juhannus" en-havas ankaŭ la religian flankon de la festo, ĝi ja estas la memor-festo de la naskiĝo de Johano

## Juhannus

Bapt'isto<sup>5</sup>, kiu naskiĝis duon'jaron antaŭ Jesuo, kiun oni festas en decembro, sed la plej-parto de la Finnoj ne pensas pri tio. La fest'ado estas tute ne religia, tamen, post *Julo* (Krist'nasko) *Juhannus* estas la dua plej granda festo de la norda jaro.

Dum la festo la urboj ŝajnas fantom'ec<sup>6</sup> mal-plenaj kaj mortaj. La urb'anoj veturis kamp'aren, prefere al lago-bordoj, insuloj aŭ maro. Ili kun-prenis bonajn manĝ'ajojn, ban'kostumojn kaj karajn ge-amikojn. Se la vetero permesas, oni mal-dormas preskaŭ la tutan nokton ekstere. Unuj festas ĉe sub-ĉiela festo-

*Ne serĉu feliĉon malproksime,  
ĝi estas en vi mem!*

*Feliĉo ne konsistas el tio, kion oni posedas,  
sed sekvas el la maniero, laŭ kiu oni pensas.*

*Laŭ MOVADO SEN NOMO*

SOMERMEZA  
FESTO

fajro, boatas, naĝas, rostas kolbas'etojn, babilas, dancas. Aliaj, bedaŭr'inde, trinkas tro da alkoholaĵoj<sup>7</sup>. Ĉiu-jare okazas incendioj<sup>8</sup> kaj dronoj. En la insul'aro Alando la subĉielan festofajron anstataŭas alta festo-stango<sup>9</sup>, kiun oni star'igas en la korto aŭ proksime al la fest'ejo. La stangon oni ornamas per ŝnuroj, flor'bukedoj, rubandoj kaj malgrandaj modeloj<sup>10</sup> de vel'ŝipo<sup>11</sup>. La kun-labor'ado por star'igi la festofajron aŭ la festostangon kreas bonan etoson<sup>12</sup> kaj donas apetiton. Kompren'eble, la komun'umoj aŭ familioj provas superi unuj la aliajn en la kre'ado de la festo.

**L**a kamparajn domojn oni ornamas per betuloj<sup>13</sup>, kiuj staras ambaŭflanke de la en-ir'ejo. En

la domo sovaĝaj floroj pli-bel'igas la murojn kaj tablojn. Tiu-sezone plej ofte floras konvaloj<sup>14</sup> kaj sorpo-arboj<sup>15</sup>. Oni ornamas la ĉambrojn kaj eĉ aŭtojn ankaŭ per junaj betul'branĉoj. En kelkaj regionoj oni kuiras el lakto specialan juhannus-supon, kiu aspektas kiel hel'ruĝa fromaĝo en likv'aĵo<sup>16</sup>, sed tiun ĉi tradician pladon aprezas<sup>17</sup> ĉefe aĝ'uloj. Junaj homoj nuntempe havas multajn aliajn frand'aĵojn.

**K**elkaj knabinoj ŝerce provas antaŭ-scii sian futuron<sup>17</sup>. Ili plukas<sup>18</sup> sep mal-samajn florojn kaj metas ilin sub la kusenon por la nokto. En songo ili, eble, vidos sian kor'amikon, fianĉon. En la pasinteco magi'aĵoj ludis multe pli gravan rolon.

**V**er'dire ne ĉiuj deziras aŭ povas for-lasi la urbojn. Ankaŭ en la urboj oni povas, ja, festi: pup'teatr'aĵoj, iluziistoj, koncertoj, baloj, bankedoj... Sed plej gajaj estas la personoj, kiuj mem laboras por est'igi la feston kaj ne nur pasive partoprenas.

*Raita Pyhälä, Finnlando*

**“Pavlo, tiu vazo, kiun vi dis-rompis, estis el la 17-a jar'cento!”**

**“Ho, bone por mi. Mi jam pensis, ke ĝi estis nova.”**

*Dieter Berndt, Germanio*

1. tempo, kiam nokto estas plej (mal)longa / 2. bru'ado de ondo-batoj / 3. havis inter si grandan diferencon / 4. ven'ig'itaj el ekster-lando / 5. bapti: doni nomon al iu / 6. tim'ige kiel en nokta tomb-ejo / 7. drink-aĵoj / 8. brul-egoj / 9. longa ligna aŭ metala peco / 10. malgrandaj imit'aĵoj de grandaj objektoj kiel ŝipo, aviad'ilo, lokomotivo ktp. / 11. velo: vento-tuko / 12. ĝenerala humoro de partopren'antoj / 13. arbo-speco de nordaj regionoj / 14. maj-floroj / 15. flu-aĵo / 16. taksas la valoron de io / 17. estont'econ / 18. milde de-ŝiras per fingroj.


**cikatro:** vundo-loko  
**ssekuro:** sendanĝer'eco

1. Ĉirkaŭ-barita teksto, kiun iu diras en bildstrioj / 2. rigardi ĉu la solvo estas ĝusta aŭ ne. *Daŭrigo* sur p. 15.






**Divenu,  
kie ni estas!**




Saluton! Mi estas Nina! Ĉu vi  
memoras min? Jen nia dua vizito.  
Rigardu la bildon. Kion vi vidas?  
Kion faras la homoj? Kion ili krias?  
Skribu tion en la parol'bobeloj<sup>1</sup>.  
Sube, ni prezentas al vi poemon!



Pro mordego akra  
Atentu pri leono  
De l' viktim' cikatra  
Restos sole ono!

La reĝo sen teruro  
Vizit'indas best'gardene  
En-ferm'ita en sekuro  
Ĝi, ne vi, troviĝos ene.



Ĉu vi diven-  
nis, kie ni  
estas? Turnu  
la paĝon por  
kontroli<sup>2</sup> vi-  
an divenon!





### Jen plano por la pup'teatra prezento:

#### Kio devas okazi?

1. La ĉas'isto devas stari sur la vosto de la leono.
2. La leono devas vek'iĝi.
3. La ĉasisto devas salti unu metron en la aeron.
4. La leono devas rori<sup>3</sup> (laŭte!).
5. La ĉasisto devas salti du metrojn en la aeron.
6. La leono devas ĉasi la ĉasiston.
7. La ĉasisto devas for-kuri.
8. La dua ĉasisto devas ĵeti reton sur la leonon.
9. La unua ĉasisto devas eskapi<sup>4</sup>.

#### Kio fakte okazis?

1. Ĝis punkto sep, ĉio funkciis<sup>5</sup> perfekte. Sed ekde ok:
8. La dua ĉasisto ĵetis la reton sur la unuan ĉasiston.
9. La leono kaptis la unuan ĉasiston.
10. La dua ĉasisto falis el la arbo sur la leonon.
11. La leono roris (ege laŭte!!).
12. La ĉasistoj unua kaj dua kaj la reto saltis 2, 3 kaj 4 metrojn (respektive<sup>6</sup>) en la aeron.
13. La pupisto de la leono paŝis sur la piedon de la unua ĉasisto.
14. La pupistoj kverelas<sup>7</sup> kaj batalas.
15. Ĉiuj aplaŭd'egas.

### Jen plano por alia pupteatra prezento.

#### Imagu, ke la prezent'ajo malsukcesas, tute fiaskas<sup>8</sup>, kio fakte okazis?

1. Fajro-buŝa drako<sup>9</sup> devas ŝteli princ'inon<sup>10</sup>.
2. Kavaliro<sup>11</sup> devas savi ŝin.
3. La drako devas en-dorm'iĝi.
4. La kavaliro devas piki la drakon per ponardo<sup>12</sup>.
5. La princino devas eskapi.
6. La drako devas el-spiri fajron.
7. La kavaliro devas fali de la ĉevalo.
8. La princino devas savi la kavaliron de antaŭ furioza<sup>13</sup> drako.

Ĉu la prezentaĵo rikoltis sukceson?

Ĉu vi jam verkis vian fabelon?

La lim'dato baldaŭ venos:

31 julio 2001

Adreso:

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala  
Finnlando

Rete: [instituutti@taivalkoski.fi](mailto:instituutti@taivalkoski.fi)

#### Daŭrigo de PIEDNOTOJ sur p.12.

3. rori: tim'ige blek'egi / 4. sin savi for-kurante / 5. iris normale, laŭ la plano / 6. rilate al ĉiu en sin-sekva vic'ordo / 7. aĉe mal-pac'iĝas inter si / 8. mal-sukces'egas / 9. plur'kapa timiga fabela best'ego / 10. belan riĉan fraŭl'inon de alta de-veno / 11. alt-ranga junulo en la mez'epoko aŭ fabelo / 12. pinta ambaŭ-tranĉa pik'arm'ilo / 13. mal-trankvil'ega.






## Respondu! Diskutu!

- Ĉu iam vi konstruis pupteatron?
- Se jes, kiujn rakontojn vi prezentis?
- Kiujn pupojn vi konstruis? Kiel? El kio? Kiel ili aspektis?
- Ĉu estas pupteatro en via urbo?
- Kiam vi laste vidis pupteatraĵon?
- Pri kio ĝi temis?
- Ĉu vi ĝuis ĝin?

## VORT'MIKSOJ

Jen ses vortoj pri pupteatroj. Sed la literoj estas miks'itaj. Trovu la ĝustan vorton kaj skribu ilin en la kvadratoj kaj cirkloj.

① KINOFORMO




② JETIEBLO



③ KREODO



④ AAADLLMNOPTŬ



⑤ BARONAJ



⑥ IIIRDG



Por helpi vin, jen difinòj de la trov'endaj vortoj, sed ne en ĝusta ordo:

tiu, kiu sidas apud vi / vendo-loko / bezon'ata por laŭtparolilo / iu, kiu ne ĝuas la spektaklon / la belaj bildoj kaj objektoj sur la scenejo / pupisto, kiu prezentas komedion volas ... la publikon

Nun prenu la literojn, kiujn vi skribis en la cirkloj supre, kaj loku ilin sube en la cirkloj.

Vi pri-skribos belajn pupojn, kiujn oni lerte viv'igas per ŝnuroj.



**Ĝis revido en septembro! Ĝis tiam agrablajn feriojn!**

Elizabeta  
RAJT-  
MĀR

# DIVEN" LUDO?



• Kio estas pli peza, ĉu kilogramo da plumo aŭ kilogramo da fero?

*(Ili estas egale pezaj)*

• Sur arbo sidis 13 birdoj. Ĉas'isto mort'pafis unu el ili.  
Kiom da birdoj restis sur la arbo?

*(Neniom. La ceteraj for-flugis.)*

• Du infanoj inter-parolas. Unu diras al la alia.

A: Mi desegnas bildon. Jen ĝi.  
Kaj nun divenu, kion prezentas la bildo.



B: Mi ne scias.

A: Antaŭ la domo rajd'istoj estas for-ir'intaj. Vid'iĝas nur la vosto de la lasta ĉevalo.

B: Bone. Kaj nun mi desegnas. Jen, vidu!  
Kion ĝi prezentas?

A: Mi ne scias.

B: Kion la antaŭa bildo.  
La rajd'istoj est'iĝis grandan polvon. Nenio estas vid'eblo.



Se vi povas helpi niajn mal-riĉajn geamikojn, al-iru nian TTT-ejon:  
[www.banzai-kkt.sulinet.hu/esperanto](http://www.banzai-kkt.sulinet.hu/esperanto) kaj trovu la paĝon:

VERDA SOLIDARECO



Sciu, ke post ĉiu numero (escepte de n-ro 2 kun la rezulto de n-ro 1) la konkurs'antoj estas list'ig'itaj du-maniere, nome:

- ① Listoj kun nomoj, naci'ecoj kaj poentoj (laŭ mal-kresk'anta vico) akir'itaj de la konkursantoj en la *lasta* kvizo. (Nia revuo aper'igas nur la pintojn en ĉiuj tri kategorioj.)
- ② Listoj kun sum'ig'itaj poentoj, kolekt'itaj de la konkursantoj per ĉiuj antaŭaj kvizoj de la konkurso-jaro (en la junia n-ro tia listo, kompreneble, ne povas ekzisti, ĉar sumigi oni povas nur poentojn de pli ol unu kvizo).

Vi povas partopreni en la kvizo post ioma ajn n-ro. Provu mezuri viajn sciojn lingvajn kaj kulturajn. Ne forgesu, ke solv'ante la task'etojn vi povas konsulti librojn, gazetojn kaj geamikojn.

La regularon vi trovas en la antaŭa numero: 1/01 (96), marto 2001.

Kompletajn listojn vi trovas en nia hejm'paĝo. Vizitu ĝin, ni petas:

[www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto](http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto)

## K I O ?

**Kio? Kio? Kio?**

**Kio estas tio?**

**Vi demandas: kio?**

**Kio estas kio?**

**Kio? Kio? Kio?**

**Kio estas tio?**

**Mi ne scias, kio.**

**Kio estas kio?**

**Kio estas m o n d o ?**

**Kio estas o n d o ?**

**Kio estas p o m o ?**

**Kio estas h o m o ?**

**Mondo estas ĉio.**

**Homo estas: ĉiu.**

**Ĉiu en la mondo**

**estas ŝaŭm' sur ondo.**

Blazio VAHA

*La plej lertaj solv'intoj  
de la marta numero  
(Redaktis kaj korektis:  
Dieter BERNDT, Germanio)*

### 1-a kategorio:

*Ágnes Gulyás (IK), HU: 28 p.  
Elina Tauriainen (gr), FI: 23 p.*

### 2-a kategorio:

*Marija Mitevskaja, MK: 28 p.  
Samanta Čajić, HR: 28 p.  
Marina Milković, HR: 27 p.  
Kristina Orlović, HR: 27 p.  
Martina Gregurić, HR: 27 p.*

### 3-a kategorio:

*Mária Molnár, HU: 30 p.  
Lenče Efreanova, MK: 28 p.  
Erkko Mäki, FI: 27 p.  
Péter Tihanyi, HU: 26 p.  
Ekaterina Popoviciu, RO: 25 p.  
Pavol Petrik, SK: 24 p.*

- 1 Trovu almenaŭ ses vorto-parojn, kiuj disting'igas nur per simpla ĉapel'eto, kiel ekzemple en *pasi - paŝi*. (3 poentoj)
- 2 Per afiksoj<sup>1</sup> kreu almenaŭ naŭ vortojn el la radiko *jun-*. (3 poentoj)
- 3 Konstruu frazon per la don'taj vortoj: *de, el, Esperanto, estas, hom'aro, ideoj, la, la, noblaj, plej, unu* (3 poentoj)
- 4 Esprimu per unu vorto: *ekzameni ĉiujn detalojn de fenomeno* (3 poentoj)
- 5 Kolektu ses vortojn, kiuj konsistas el ne malpli ol tri afiksoj (ekzemplo: *ar'iĝ'ilo*) (3 poentoj)
- 6 Via ret'amik(in)o havas naskiĝ'tagon. Kiel vi gratulas? (3 poentoj)
- 7 Re-skribu la frazon<sup>2</sup> en pasiva formo: *Oni malfermas nian vendejon je la 6-a matene.* (3 poentoj)
- 8 Kie troviĝas la sid'ejoj de UN kaj UNESKO? (4 poentoj)
- 9 Kie okazos la ĉi-jara IJK (Internacia Junulara Kongreso)? Kioma ĝi estos? (3 poentoj)
- 10 Solvu la enigmon: *b b* (2 poentoj)

La solvojn sendu al: *Geza Kurucz, Hítel u. 10. fszt. 16, H-6000 Kecskemét, Hungario*  
 Ret'adreso: <[suli267@szeged.sulinet.hu](mailto:suli267@szeged.sulinet.hu)>

1. vort'fariloj kiel *ist, re, mal, iĝ...* / 2. lingva formo de unu simpla konstato, kiel la ekzemplo

### Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 1)

1. *dompordo, urbodomo, urbopordego, havenurbo, infanlibro, parkobenko.*
2. *Pri tio scias nek li, nek mi. Nek ŝi, nek li estis tie.\**
3. *Post promeno en parko mi volas ripozi sur tiu benko.*
4. *Ĉampano.*
5. *Legu la revuon Juna Amiko, kiu estas facillingva, interesa, kofora kaj riĉe ilustrita.\**
6. *surmurigi, enpoŝigi, endormiĝi*
7. *... faras. ... oro. ... estas.*
8. *vivi, viŝi, ŝimi, limi, mini, lici, vici*
9. *kaserolo, poto, telero, kulero, forko, tranĉilo, taso, glaso, kruĉo ...*
10. *Afrika birdo.*
11. *Ne vera.*
12. *Bratislavo, Bukareŝto, Tirano, Rejkjaviko, Moskvo, Lisbono*

\* *ekzistas ankaŭ alia(j) ĝusta(j) solvo(j).*



“Ĉu emoj de infanoj kaj plen'kresk'uloj diferencas?  
– Ne, tute ne, nur la lud'iloj estas multe pli kostaj!”

(Popola oni-diro)

## LUDOJ KIUJ LUDAS NIN...

**E**stas mal-facile trovi homon, kiu ne ludis iun komput'ilan ludon. Estas ankaŭ malfacile trovi homon, kiu, lud'inte, restis tute trankvila kaj indiferenta<sup>1</sup>.

“Nu kaj kio? Tio ne gravas por mi, prefere mi...” Ver'ŝajne tiun aŭ similan el-diron Vi, kara Leg'anto, apenaŭ povas aŭdi. Male, special'istoj kaj kurac'istoj estas tre mal-trankvilaj. Homoj, precipe junaj, sidas po 2-12 horojn tage\* ĉe komput'ilo kaj ili trejnas<sup>2</sup> sole la muskolojn<sup>3</sup> de la fingroj, anstataŭ mem ludi futbalon<sup>4</sup>, flug'pilkon, kaŝ'ludon aŭ aliajn aktiv'igajn ludojn.

“Nu jen, ankoraŭ unu moral'isto<sup>5</sup>, kvankam fak'ulo pri komputiloj, «remaĉas<sup>6</sup>» la temon...” – mi jam antaŭ-imagas vian penson, kara Leg'anto. Mi konfesas: jes, mi ludis, ludegis... kaj nun lud'etas, kvankam libera tempo tute mankas.

**K**io, do, al-tiras, altir'egas homojn al monitoro<sup>7</sup>, al klavaro<sup>8</sup>, al stir'stango<sup>9</sup> kaj devigas premi klavojn, tiri stirstangon dum horoj 1, 2, 3, 4... long'eege? Pro tio mi elektis iom ŝercan titolon por la artikolo. Kompren'eble, estas aliaj, ne-komputilaj ludoj kiuj, foje, eĉ sen-vest'igas tro lud'eman homon (ver'similaj anekdotoj pri Las Vegas k.s.) ;-).

**K**ialoj estas multaj, tamen la ĉefa estas, laŭ mi, la naturo mem de la homo – la ludo estas simpl'ig'ita modelo de la naturo kaj pere de tiu simpligita naturo, la homo esploras la treege komplikan<sup>10</sup> ĉirkaŭan mondon. En komputilo estas tre facile re-komenci de ajna punkto ludan epizodon<sup>11</sup> kaj kontent'igi la homan sci'vol'emon – “Kio okazos, se...”. En la reala vivo “oni ne povas en-iri en la saman riveron du-foje”. Dua kaj ne mal-grava kialo estas dezir'ego venki mal-amikon, senti sin heroo, lert'ulo k.s.

**E**kzistas, kompreneble, primitivaj<sup>12</sup> ludoj. Mi speciale lasis en mia komputilo la ludon “Whack”, kaj kiam oni petas min start'igi ludon, mi startigas ĝin... kaj post kvin minutoj la homo for-iras. Kial? Ĉar la ideo de la ludo mem estas tre primitiva, ĝi rapide tedas<sup>13</sup>. Estas aspekte simplaj, sed tre geniaj<sup>14</sup> – “Tetris”, “Lines” k.a. Estas pli komplikaj kaj instruaj, ekzemple, “Pharaones” pri la antikva<sup>15</sup> Egiptio. Tamen plej popularaj estas la batalaj aŭ militaj ludoj – “Warcraft”, “Gold Axe”, “Heretic”, “Duke Nukem”, “Starcraft” kaj multaj aliaj. Ilia ĉefa trajto – sang'avidaj kaj fabelaj monstroj<sup>16</sup>. Tamen, dum longa lud'ado, oni venas al konstato ke, se vi batalas kontraŭ komputilo, ĝi estas tre

stulta<sup>17</sup>! Certe, estas pli interese ludi en komputila reto, sed "la ludilo" estas tre multe-kosta...

Ankoraŭ pri unu flanko de iuj ludoj – ili estas perfort'emaj kaj sang-avidaj. Antaŭ-nelonge, mia kon'ata ŝoforo plendis ke, post iu ludo ("Armageddon"?), kie – por kolekti pli da poentoj – necesas renversi aŭtojn, sur-veturi pied'ir'antojn, duontagon li ne povis normale labori, ĉar ie, en la kapo aperis aĉa penso surveturi preter-pas'anton aŭ frakasi<sup>18</sup> antaŭan aŭton, kiu ne veturas sufiĉe rapide...

Dum la lastaj 10 jaroj aperis tre multaj komputilaj ludoj kaj ili iĝas pli kaj pli komplikaj kaj grand'egaj: 1 – 10 – 100 – 3 KD-ROM Megabajtoj! Ho ve, por ludi modernan<sup>19</sup> ludon, oni bezonas pli pov'uman komputilon. Mi eĉ kuraĝas diri, ke la nunan mir'indan evoluon de la persojnaj komputiloj motivas<sup>20</sup> la



lud'antoj! Ĉu vi ne sam'opiniis? Vidu, pli kaj pli komplikaj video-kartoj, pli povumaj procez'iloj kun multimediaj komandoj, bon'sonaj muzikaj kartoj – ĉu por sciencaj esploroj? ;–)

Do, ludu, amikoj, sed ne tro! Sciu, ke el la okuloj vi ne havas rezervojn. Ankaŭ sciu ke, per aĉeto de nova ludo, vi kontribuas al la progreso de la komputila tekniko. ;–)

*lama pasia ludanto:*

Geĉjo BASOV,

Rusio

<gbasov@  
hcei.tsc.ru>

FIDO:

< 2:5005/  
42.4 >

\* Laŭ higienisto<sup>21</sup>, homoj de 6-9 jaroj devas sidi malpli ol 20 min/tage, de 9-14 jaroj: 1 horon, de 14-18 jaroj:

2 horojn, de 18-21 jaroj: 3 horojn, super 21 jaroj: 4 horojn; ene de ĉiu horo necesas fari 5-7-minutan paŭzon.

1. montr'anta nenian intereson / 2. sporte fort'igas / 3. mov'ilojn de korpo-partoj / 4. pied'pilkon / 5. specialisto pri sociaj (mal)bono / 6. dis-pec'igas per dentoj / 7. tele-vid'ilo / 8. buton'aro per kiu oni en- portas informojn en komputilon / 9. direkto-bastono'eto / 10. malsimplan / 11. ag'ad'serio; parto de la tuto / 12. enu'ige simplaj / 13. enu'igas / 14. brile saĝaj / 15. pra-tempa / 16. tim'igaj best'egoj / 17. mal-saĝa / 18. dis-rompi; dis-pec'igi / 19. nun-tempan / 20. donas puŝon, kaŭzon al iuj agoj / 21. higieno: scienco pri sano-konservado

KULTURAKTO

Abonu kaj legu la du-monatan soci'kulturan revuon de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)** el-don'ata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)



**O**kazis foje, ke Nasredin Hodja aĉetis en foiro<sup>1</sup> bon'egan mulon<sup>2</sup> por kvin or'mon'eroj. Kiam li iris hejmen tra arb'aro, konduk'ante la beston per kol'brido<sup>3</sup>, ne-atend'ite lev'iĝis vent'ego. Tondr'egis, furiozis<sup>4</sup> ŝtormo<sup>5</sup>, fulmoj batis teron kaj arbojn ĉirkaŭ li. La mulo baŭm'ante<sup>6</sup> timblekis. Nasredin opiniis, ke venis la lasta horo de lia vivo. Est'ante pia<sup>7</sup> islam'ano, li promesis ke, se li trans-vivos ĉi tiun fulmotondregon, li vendos la mulon kaj la ricev'itan monon donacos al la unue renkont'ita almoz'ulo<sup>8</sup>.

**P**ost ĉirkaŭ kvaron'horo, la ŝtormo pasis, ĉesis pluvi kaj venti, la ĉielo seren'iĝis<sup>9</sup> kaj, vidu miraklon<sup>10</sup>, Hodja restis inter la viv'antoj. Sed, ĉar li sav'iĝis, li devis plen'umi la promeson. Li prenis la konduk'ilon de la mulo kaj re-iris kun ĝi al la foiro. Tie li aĉetis lanugan<sup>11</sup> kok'id'eton kaj ten'ante ĝin en la mano, li atendis aĉet'antojn. Baldaŭ al-iris viro kaj demandis:

– Ĉu la mulo estas vend'ata?

– Jes –, respondis Hodja –, sed nur kune kun la kokideto.

– Kaj kiom ili ambaŭ kostas?

– La kokideto kostas kvin ormonerojn, kaj la mulon mi donas kontraŭ kupra<sup>12</sup> monero.

– Akcept'ite! – diris la aĉetanto kaj, ĉar li opiniis renkonti mal-saĝ'ulon, volis, kiel eble rapide, liber'iĝi de li. Li donis la monon kaj rapide forkondukis la mulon, port'ante kun si ankaŭ la kokideton.

**R**onforme<sup>13</sup> al sia promeso, la kupran moneron, ricevitan por la mulo, Hodja ĵetis en la ĉapon de almozulo.

## Fulmo - tondrego Histori'eto pri Nasredin Hodja

Tradukis: *Elizabeta Rajtmár*, Hungario



1. komerca kun-ven-ejo / 2. poste-ulo de vir'azeno kaj ĉevalino / 3. ŝnur'aro por konduki tir'beston / 4. sen-bride aktiv-egis / 5. vent'ego kun pluv'ego / 6. baŭmi: star'iĝi sur la mal-antaŭaj piedoj / 7. sincere fidela al Dio / 8. mal-riĉ'eg'ulo / 9. sennub'iĝis / 10. ne-ĉiu-taga mir'ind-aĵo / 11. lanugoj: har'similaj plum'etoj / 12. kupro: flave ruĝa metalo (Cu) / 13. ĝuste laŭ; tiel kiel io postulas.



Hejm'paĝo: <http://lps.uniroma3.it/kler>

## Ĉu plen'kresk'uloj komprenas infanojn?

*Opinio de du ofend'itaj infanoj*

Vi certe ofte aŭdas la devizon<sup>1</sup>: “*Ne estu infano*” aŭ “*Ne ploru kiel infano (kvazaŭ vi estus infano)*”.

Per ĉi tiuj du frazoj la plenkreskuloj klare esprimas siajn antaŭjuĝojn kontraŭ la infanoj.

Ĉu estas mir'inde, ke la infanoj povas havi “malbonan bildon” pri la plenkreskuloj kaj ke ili montr'iĝas suspekt'emaj? Ĉu tiuj du frazoj esprimas pozitivan rilaton? Kompreneble ne.

La frazo “*Ne estu infano!*” atestas pri opinio, laŭ kiu la infanoj estas:

- a) mal-obeemaj, ĉar ili ofte spitas, koleras;
- b) frenez'etaj, obstinaj, pro kio la plenkreskuloj ofte bezonas iun por pri-zorgi aŭ varti ilin;
- c) mal-seriozaj kaj oni ne povas kredi al ili;
- ĉ) ne-kapablaj labori kaj kontribui al la familia buĝeto (ĉu ili estas parazitaj ĝis la 21-a jaro?)

Ĉu la frazo “*Ne ploru kiel infano!*” signifas, ke la infanoj devas honti, ĉar ili estas plor'emaj aŭ “ludas scenon” por iel venki, kompat'igi aŭ kor'tuŝi la plenkreskulojn?

*Danka Vasić kaj Dragana Bojadžić*  
lernantinoj de la sepa klaso de  
Bazlernejo Ljuba Nešić,  
YU-19000 Zaječar  
Serbio - Jugoslavio

**La tuta grupo serĉas ekster-landajn leter'amikojn, Skribu al ili!**


.....  
*Skribu al ni, kiel vi opinias pri la supraj pensoj.*

*Ĉu vi plene konsentas, sam'opinias? Kiajn spertojn vi havas?*



# ŜRAŬBOKAPO Kial la SESANGULA? estas

Certe vi jam vidis ŝraŭbojn tiajn:



La ses-angula "kapo" estas la plej ordinara. Pli mal-ofte eblas ankaŭ trovi triangulan:






Kial ne ekzistas ŝraŭboj, ekzemple, kvin- aŭ ok-angulaj?

Unue, ni observas, ke la kapo ne devas havi ne-regulan formon, ĉar tio mal-konvenas pro la sekvaj kialoj:

- 1) la ŝraŭbo-turnilo devus esti speciala por ĉiu ŝraŭbo;
- 2) la ŝraŭboturnilo re-en-uj'igus la ŝraŭbon nur post 360-grada turno.




Do, ĝi devas havi regulan formon. Vidu la tri tipojn antaŭe menciitajn:




La bildoj montras, ke la ŝraŭboj post certa turn'angulo re-venas al siaj komencaj pozicioj<sup>1</sup>. La mekanik'isto<sup>2</sup>, kiam riparas maŝinon, ekzemple aŭtomobilon, mult'foje havas mal-multe da spaco por labori (ĝenerale en mal-komfortaj pozicioj). Pro tio, la sesangula estas la plej cel'taŭga el la tri regul'formaj, ĉar ĝi ebligas prem'adon aŭ mal-premadon per malgrandaj brak'movoj. Tio faciligas lian laboron.

Ĉi-kaze iu povus demandi, kial, do, ne uzi okangulan? Ĝi ebligus eĉ pli malgrandajn brak'movojn pro sia centra angulo. Vidu:



Sen-dube. Tamen ĉi tie alia problemo okazas: la ŝraŭboturnilo emas gliti sur la ŝraŭbo dum la premado, ĉar tia ŝraŭbokapo similas al cirklo.


Por la kvinangula oni devus fabriki du ilojn:



Ambaŭ iloj havas mal-avantaĝojn:  
 – la unua emas gliti;  
 – la dua enujiĝas nur de-supre



kaj ne de-flanke.



Re-sume, la ŝraŭbokapo, kiu plej kontent'igas ĉiujn postulojn, estas sesangula. Pro tio ĝi estas la plej ordinara.

*Evandro de Freitas, Brazilo*

1. stato, en kiu ĉiuj punktoj de objekto, est'aĵo trov'iĝas en la sama loko, rilate al alia objekto aŭ estaĵo / 2. homo, kiu riparas, muntas diversajn instrumentojn, veturilojn.

**Lernindaj Zamenhofaj proverboj**

*Konfido naskas konfidon.  
 Amikon montras malfeliĉo.  
 Hundo bojas, homo vojas.  
 Kontraŭ lupo ne helpas kalkulo.  
 Ĉiu havas sian propran guston.  
 Kiom da kapoj, tiom da opinioj.*

# ŜUOJ

La redaktoro star'ig'adis demandojn. La lernantoj respond'adis. La respondoj estis rapidaj kaj saĝaj. Ili tute ne konfuz'iĝis. Oni pret'ig'adis materialon por radio-el-sendo.

“Se vi estus patro de la patro, kion vi aĉetus por la patro?” estis unu el la demandoj.

*Saŝa:* Mi aĉetus grandan aŭton.

*Svetlana:* Mi aĉetus pilkon.

*Milan:* Mi aĉetus novan televidilon.

*Vanja:* Mi aĉetus ĉokoladon.

*Dragan:* Mi aĉetus elektran ludfer'vojon.

*Ĵika:* Mi aĉetus ŝuojn.

La redaktoro ek-rigardis la blondan knab'eton, vest'itan per pal'kolora vestaĵo.



– Kial ĝuste ŝuojn? – demandis la redaktoro.

– Ŝuojn li pleje bezonas. Tiuj, kiujn li havas estas for-uz'itaj kaj ili ĉiam plenas je ŝton'etoj.

La redaktoro karesis la kapon de Ĵika kaj ekrigardis al la instruisto. En la bluaj okuloj de Ĵika ek-bril'etis du mal-gajaj perloj.

*Vesiljka Nikolić, Jugoslavio*



1	2	3	4	<b>MA GIA</b>			
2							
3							
4					5	6	7
<b>ENI GMO</b>				5			
				6			
				7			

**Skribu horizontale (→) kaj vertikale (↓) la samajn vortojn!**

1. Mal-facile paš'anta;
2. La unua viro (R)\*;
3. En kontraŭa senco;
4. Kontinento;
5. Tuto de instrumentoj (R);
6. Tre ŝat'ata;
7. Urbo en Alĝerio.

\* R = radiko

*Dieter BERNDT,*  
Germanio

Nokte oni vokis kurac'iston al riĉa paciento, kiu plendis pri siaj doloroj imag'itaj:

– Ho, doktoro, mi certe mortos.

La kuracisto ekzamenis lin, sed ne trovis lin mal-sana.

– Ĉu vi jam pret'igis vian testamenton? – demandis la kuracisto.


– Ne, ĉu mi... – pal'iĝis la paciento.

– Bon'volu tuj al-voki viajn advokaton, filojn kaj bo-filinojn –, respondis la kuracisto.

La paciento obeis kaj, poste, ĝem'ante, demandis al la kuracisto:

– Ĉu mi mortos nun?

– Ne, vi estas tute sana, sed mi ne volis esti la sola stult'ulo, kiun oni vane vekis nokto-meze kaj ven'igis sen-bezone al via domo –, respondis la kolera kuracisto.




*Raita Pyhälä*

## SOLVOJ de Ludu (n-ro 96, p.23)


① Metu la mon'erojn al ĉiuj kvin pintoj kaj al ĉiuj pinto-radikoj.

② Jen:



③ La familio havas tri filojn kaj kvar filinojn, t.e. sep gefilojn.

④ Jen:



⑤ La arbo havas tri branĉojn por kvar birdoj.

*Ĝis la 1-a de majo solvoj ne venis, bedaŭrinde.*

### Abon'tarifoj de Juna Amiko por la jaro 2001

	EUR / USD	DEM	2-4 ekz.	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	10,80	21	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 2	6	12	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	4	8	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF		po 480 HUF		—

## juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

28-a jaro, n-ro 2 (97), 2001

Aperas 4 fojojn jare

Redaktoro: *Géza KURUCZ* (Hitel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)

Retadreso: [suli267@szeged.sulinet.hu](mailto:suli267@szeged.sulinet.hu)

Vicredaktoro: *StefanMacGill* (retadreso: [stefan.macgill@galamb.net](mailto:stefan.macgill@galamb.net))

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *s-ino Raita Pyhälä* (Finnlando), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Zoran Ćirić* (Jugoslavio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Gennadij Basov* (Rusio), *Bardhyl Selimi Mezin* (Albanio), *Tili Dahlenburg* (Germanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwiri-kiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah B. Attiog-be-Agbemadon* (Togolando), *José J.Campos Pacheco* (Kubo), *Anja Karkkainen* (Finnlando).

Grafikisto: *Irina Nagy* (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio)


Komputila kolora tekniko: *János Bak* (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Ĉinojn u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1318





# SOVAĜBESTOJ DE AFRIKO